

NEW YORK
PUBLIC LIBRARY
ASTOR, LENOX AND
TILDEN FOUNDATION

A Journal of the
International Language

AMERIKA ESPERANTISTO

(AMERICAN ESPERANTIST)

Per Copy, Ten Cents
Per Year, One Dollar

1239 MICHIGAN AVENUE
CHICAGO, U. S. A.



FAKO DE KORESPONDADO

Your name and address below, two issues, 25 cents.

*Oni deziras nur leterojn ; * nur poŝtkartojn ilustritajn.

J. Cliff Anderson, Terre Haute, Indiana, U. S. A.

Harold Bunker, Merrick, N. Y.

Fno. Clara Todson, 23 The Spurling, Elgin, Ill.

H. E. Williams, Newtown, Mo.

*T. J. Brackett, Rfd. 1-17, Greenland, N. H.

*Wm. T. Ross, Mound, Alta., Canada.

P. B. Glloldi, Tampico, Mexico.

*Marcel Lefevre, 11 St. Mare, Orleans, France.

Kosta Tv. Pačigargeo, Plevna, Bulgaria.

*P. Manuel Jose Fernandez, Coŭto-Arcos de Valdevez,
Portugal.

Michel Ambros, Ekateringofskij Pros., D. 12, kv. 31,
St. Petersburg, Russia.

*Sro. Le Grignoux, 45, rue de l' Esperance, Paris, XIII.

*F. J. Macalik, I. U. S., Hamovu, Hungary.

*J. Jenč, Havličkova 37, Prag-Zizkov, Austria.

Karl Jost, Zwinglstr. 13, Zurich III, Switzerland.

*A. Zahel, Taborska 19, Praha II, Bohemia.

Sro. Enauld, rue du St. Esprit, Verdun, Meuse, France.

Sro. Adam, 2, rue des Rouyers, " " "

Raoul Oury, Bloise, France.

R. Dousset, Arsonval, p. Bar-s-Aube, France.

Chr. Stoll, Hanau a-M., Germany.

*A. Garin, Avenida de la Estacion, Tolosa, Guipuzcoa,
Spain.

SOMETHING YOU NEED AND HOW TO GET IT

Hundreds of our readers correspond with foreign Esperantists. Certainly all should do so. Have you ever observed, after a particularly futile attempt to decipher the signature of one of these jaspers, with what delight you found that he had atoned for his sinful chirography by calmly and christianly rubber-stamping his full heathen name and address in plain Gothic letters - on the other side of the postal card? Of course *you* never write that way, but other Americans do, and in far-away Cathumbia I heard Sro. Hladolbskuun beseeching his tan-colored gods to put the kibosh on a certain amerikano, Smitherkins by name, who writes it Zizzlewoooooof. Moral: Forty cents to us gets you a three-line, 30c a two-line stamp.

BEST OF ALL, we've fixed it with a Chicago manufacturer to make us a quantity of stamps in small watch cases. These stamps are the acme of neatness and convenience. You press the stem, and instead of showing you the time of day or Helen May's grinning face, the "watch" offers you a stamp, ready-inked, marking your name and address. We sell it for \$1.25, but it's yours for the asking if you estos varbinta two new subscribers to *Esperantisto*.

Amerika Esperantisto

Entered as second class matter June 28, 1907, at the post office at Chicago Illinois

Monata Revuo de la Lingvo Internacia, Esperanto
Monthly Magazine of the International Language, Esperanto
1239 Michigan Avenue, Chicago

Jarabono, Ie en la Mondo, Unu Dolaro (Spesmiloj 2.05)
Yearly Subscription, Anywhere on Earth, One Dollar

AMERIKA ESPERANTISTA KOMPANIO, **ELDONANTOJ**
AMERICAN ESPERANTIST COMPANY, *PUBLISHERS*

Redaktoro : **ARTHUR BAKER** : *Editor*

Ĉiu manuskripto estas, se tiel petate, nepre resendata al la sendinto. La redakcio rifuzas nenion sekve de ĝia temo, aŭ politika aŭ alia; kaj senescepte retenas al si la rajton korekti manuskriptojn. Sendu verkon.

VOLUMO 2

OKTOBRO, 1907

NUMERO 3

Farizeoj lingvistaj oni povas nomi tiujn homojn, kiuj senĉese predikas la neflekseblecon kaj mikroskopian akuratecon de Esperanto. Al tiuj la lingvo ŝajne estas plej grava kiam ĝi ludas rolon ("ho! ho!" krias Sro. Tre Ega Precizeco, "oni ne ludas rolon—oni plenumas, eble prezentas, sed ne ludas ĝin; kaj ĉu lingvo estas *vivanta* estaĵo? Ĉu ĝi povas ludi, kiel katido aŭ infano? Ridinde!") de temo por senfina diskutado pri tiaj gravaj punktoj kia tiu, ĉu oni malsaniĝas aŭ fariĝas malsana. Nenia bono (aŭ, Sro. T. E. P., ĉar vi insistas, *bonaĵo*) povas rezulti el (aŭ *de*, Sro. Matematika Ekzakteco) tiaj diskutadoj, precipe kiam ili estas farataj en klubejoj, ĉar ili ne sole donas al lernantoj la konvinkon ke Esperanto ne estas facile lernebla, sed ili malŝparas tempon direkteblan al aliaj kaj pli grayaj aferoj. Tute tiel same kiel en la antikvaj eklezioj, kiam mankis la religia spirito oni diskutadis energie pri la ceremonioj, nun certaj esperantistoj, ne konante aŭ havante la spiriton de la esperantismo, farizee elklarigas al si reciproke la belajn malgrandajn punktojn de la retoriko. Kaj laŭ mia observado, ili kutime faras tiajn diskutadojn *en sia propra nacia lingvo!*

KELKAJ ZAMENHOFAJ VORTOJ

El parolado farita en London

Multajn fojojn mi ripetis, kaj en Bulonjo mi proklamis per oficiala deklario, ke la esperantismo celas nur al tio, ke ia taŭga kaj vivpova komprenilo inter la popoloj ekzistu, sed ke la formo de tiu komprenilo estas por ni—aŭ almenaŭ por mi persone—tute indifera; ke se, anstataŭ fari konstantajn kaj senfinajn eksperimentojn kaj teoriar rezonadon ni decidis elekti la pretan kaj elprovan lingvon Esperanto kaj labori speciale kaj ekskluzive por ĝi kaj fiksi por ĝi netuŝeblan fundamenton—ni faris tion ĉi ne ĉar al ni plaĉas speciale Zamenhof kaj lia verko kaj ne tial, ke li volas esti ia papo; kiel mensoge kredigas diversaj niaj kontraŭuloj—sed nur tial, ke la esploro kaj sperto montris al ni ke tia maniero de agado estas la sola, kiu plej certe alkondukas nin al nia celo. Al la personoj, kiujn nia bele elkreskinta arbo ne lasas dormi, kaj kiuj per ĉiuj vortoj penas ĝin subfosi, ni vokas: se vi havas alian vojon, kiu povas nin konduki al nia celo pli bone kaj pli certe, montru ĝin al ni, kaj ni ĝin sekvos. Sed vi scias, ke vi proponas ne ion pretan kaj certan, sed nur supozojn kaj teoriajn opiniojn; vi scias, ke se ni dekliniĝus de nia disciplina vojo kaj lasus fali Esperanton, tiam la konfido de la mondo por la ideo mondolingva, konfido fine akirita post centoj kaj miloj da faroj de nekredado pereus por ĉiam kaj jam neniam povus esti reakirita; vi ĉion scias, kaj tamen vi per ĉiuj fortoj penas senkreditigi nin en la okuloj de la mondo. Bone, daŭrigu do vian Herostratan laboradon, kaj ni iros trankvile nian vojon.

“La dua kulpigo, kiun ni ofte devas aŭdi, estas tio, ke ni esperantistoj estas malbonaj patriotoj. Kontraŭ tiu ĉi mensoga, malnobla kaj kalumnia kulpigo ni protestas plej energie, ni protestas per ĉiuj fibroj de nia koro! Dum la pseŭdo-patriotismo, t. e. la genta soviniismo, estas parto de tiu komuna malamo, kiu ĉion en la mondo detruas, la vera patriotismo estas parto de tiu granda tutmonda amo, kiu ĉion konstruas, konservas kaj feliĉigas. La esperantismo, kiu predikas amon, kaj la patriotismo, kiu ankaŭ predikas amon,

neniam povas esti malamikaj inter si. Vi, nigraj semantoj de malpaco, parolu nur pri malamo al ĉio, kio ne estas via, parolu pri egoismo, sed neniam uzu la vorton "amo", ĉar en via buŝo la sankta vorto "amo" malpuriĝas.

"Ho patriotismo, patriotismo, kiam fine la homoj lernos kompreni ĝuste vian sencon! Kiam via sankta nomo ĉesos esti armilo en la manoj de diversaj malhonestuloj! Kiam fine ĉiu homo ricevos la rajton kaj la eblon algluiĝi per sia tuta koro al tiu peco da tero, kiu lin naskis!

"Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj. Anstataŭ konstante batali inter si, elŝiri la patrujon unuj al la aliaj, perforte altrudi al si reciproke siajn lingvojn kaj morojn, ili vivos inter si pace kaj frate, en plena interkonsento ili laboros sur la tero, sur kiu ili vivas, kaj kontraŭ tiuj krudaj fortoj de la naturo, kiuj ilin ĉiuj egale atakas. Kaj kune kaj interkonsente ili celados ĉiuj al unu vero, al unu feliĉo. Kaj se iam venos tiu feliĉa tempo, ĝi estos la frukto de konstanta kaj senlaca laborado de tiuj homoj, kiujn ni vidas nun en ĉi tiu Ĉambrego kaj kies nomo, ankoraŭ tre malmulte konata kaj tre malmulte ŝatata estas 'esperantisto'."

NIAJ BLINDAJ SAMIDEANOJ

Unu el la plej interesaj okazintaĵoj de la Kongreso en Cambridge estas la kunveno de la blindaj Esperantistoj el multaj landoj de la terglobo. Kelkaj venis el Francujo, Svisujo, Danujo, Unuigitaj Ŝtatoj, Holando kaj Anglujo, kaj granda estis ilia ĝojo povi ĉeesti. Tio, kompreneble, nur efektiviĝis dank' al la bonecon de amikoj de la afero, kiuj helpis per monoferado.

Grandanombraj kaj gravaj estas la uzoj de Esperanto, sed eĉ se ĝi estus ellaborita nur por la uzo de la blinduloj, ĝi plenumus plej valoran rolon.

Kiel ĉiu scias, la blinduloj legas kaj skribas per helpo de la Braille'a sistemo de punktoj, kiuj estas legataj per la delikataj finoj de fingroj. Skribi libron en *Braille* estas tre teda kaj multekosta afero, kaj plie, libro skribita en angla

Braille estas nur legebla por la angleparolantoj, kaj ĝi devas esti tradukita ankaŭ en la francan kaj ĉiun alian lingvon por ĉiu alia nacio ; sed se ĉiuj blinduloj lernus Esperanton kaj se libro estas "brajligita" laŭ internacia lingvo, ĝi estas legebla por la blinduloj de la tuta mondo, kaj tiel oni malfermas vastan kampon de literaturo kaj tre malpligrandigas la koston de la libroj.

Multaj estroj de blindulaj lernejoj nun vidas la bonaĵon de Esperanto, kaj preskaŭ en ĉiu lando ĝi estas instruata; la lernantoj akiras ĝin kun avideco kaj fariĝas tre rapide kapablaj korespondi kaj interŝanĝi ideoj kun blinduloj de aliaj landoj.

En Cambridge la blinduloj ĉiuj estas loĝigataj kaj zorgataj de nia sindona amiko Prof. Th. Cart, el Parizo, kaj de liaj helpantoj. Ian posttagmezon Dro. Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto, vizitis ilian tiutempan loĝejon, parolis kelkajn vortojn en la lingvon kaj premis la manon al ĉiu el ili. Tio kaŭzis al ili senliman ĝojon, kaj ili povis esprimi sian dankon al li pro la elpensado de tia bonaĵo por ĉiu el ili. Ili ankaŭ petis de li pluan favoron ; tio estis, ke li permesu al ili pasigi siajn manojn sur li, por ke ili povu juĝi pri kia homo li estas: Tion, kompreneble, li lasis ilin fari.

En la daŭro de la Kongreso okazis kunveno de tiuj, kiuj povas kaj bonvolas labori kiel helpantoj al la blinduloj ; tie oni proponis, ke, kiom fareble, ĉiu Esperantista grupo estu invitata akcepti kiel specialan protektaton almenaŭ unu blindulon, kiun ili kune povus instrui kaj helpi per iom da amzorgo kaj je malgrandega kosto. Tio estas jam farita de kelkaj grupoj, ekzemple tiuj de Brighton kaj Nottingham, kun plej feliĉa rezultato. Tie la protektatoj ĉeestas la klubon kaj estas prizorgataj de la klubanoj. Ili parolas la lingvon flue kaj skribas ĝin ĝuste kaj povas nun facile instrui aliajn. Tio kaŭzas egale tiom da ĝojo al la instruistoj kiom al la instruatoj.

Tre simpla unua lernolibro de Esperanto en *Braille* estas ĵus eldonita, kiu ebligas kiun ajn, ĉu li konas *Braille* aŭ ne, instrui la elementojn de Esperanto al blinduloj. Oni povas ĝin ricevi senpage (aŭ po nemultaj pencoj de tiuj, kiuj povas pagi ĝin), ĉe la Brita Esperantista Asocio, 13, Arundel street, Strand, London, kies sekretario bonvole donos pluaajn informojn laŭ peto.—*A. J. Adams*, en *The British Esperantist*.

LA TRIA INTERNACIA KONGRESO

(Represata el Germana Esperantisto)

La Boulogne'a Kongreso en 1905 estis la unua grandioza kaj evidenta pruvo, ke Esperanto vere estas la solvo de la grava problemo de lingvo internacia, ke ĝi estas parolebla kaj mirinde komprenebla de ĉiuj nacioj kaj tial reprezentas efektive la nepre necesan interkomunikilon tutmondan. La dua Geneva kongreso donis denove la saman certigon kaj montris, ke la elparola maniero fariĝas des pli unueca, ju pli nombriĝas la internaciaj esperantaj rilatoj, ke spite la pretendoj de kelkaj scienculoj la ĉcentriga forto de nia lingvo multe superas la diversajn forcentrigajn fortojn.

En la ĵus okazinta Tria Kongreso oni plene ĝuadis tiujn ĉi belajn fruktojn de la du unuaj kongresoj. Oni jam tute ne zorgis pri la ebleco de reciproka kompreniĝo, sed oni uzis nian karan lingvon preskaŭ same facile kaj senpene kiel la gepatran lingvon mem. Por la ĝenerala progreso, kiun la esperantistaro faris dum la pasinta jaro, ĝojiga signo estas, ke oni ankoraŭ pli multe aŭdis interparoli esperante eĉ samlandanojn. Kvankam Esperanto estas artefarita lingvo, ĝi jam ne ŝajnas arta al la esperantistaro, sed tute natura.

Krom tiu ĉi vere esenca kaj interna progresado de Esperanto ni povas konstati novajn eksterajn sukcesojn, kiuj ne estas malpli gravaj por la definitiva venko de nia afero. Ĉiam pli niaj kongresoj fariĝas oficialaj, ĉiam pli multe ili gajnas la ĝeneralan intereson de la tuta civilizita mondo, la bonvolon kaj la subtenadon de urbaj kaj ŝtataj estraroj. Unuafoje en Cambridge esperantista kongreso estis vizitata de oficiala ŝtata sendito, kaj la esperantistoj devas esti kore dankaj al la belga registaro, kiu la unua oficiale esprimis sian grandan intereson kaj favorecon por la enkonduko de Esperanto.

La konvinko pri la neceseco de internacia helpa lingvo ĉiutage plivastiĝas kaj varbas por nia afero novajn amikojn. La diversaj internaciaj kongresoj plinombriĝantaj ĉiujare, evidente sentas tiun ĉi neeviteblan necescon de ĝenerala interkomprenilo. Niaj fervoraj kaj eminentaj propagandistoj, Sro. W. T. Stead kaj Sro. A. H. Fried, kiuj partoprenas la nunan pacifistan konferencon en Hago, tie konvinkiĝis denove, ke tia konferenco povas esti vere

paca; internacia kaj sukcesplena, nur tiam, kiam oni uzos unu, neŭtralan lingvon. Sro. Stead sendis jenan leteron al la Triano, Sro. Dro. Cunningham en Cambridge.

Mia kara Dro. Cunningham:

Mi gratulas vin ke vi havas la honoron akcepti Dron. Zamenhof kaj la Esperantistan Kongreson en la fama Universitato de Cambridge. Mi, ho ve! devas resti por ĉeesti en alia Kongreso, kiu estus multe pli interesa kaj utila se ĝiaj anoj parolus Esperanton. Ju pli mi vidas internaciajn konferencojn, des pli konvinkita mi iĝas, ke Dro. Zamenhof, kreante Esperanton, liveris la solan nepran bezonataĵon por la Federacio de l' Mondo, simplan, regulan, neŭtralan slosilo-lingvon, kapablan, esti universale alprenatan. Antaŭ la fino de la jarcento, Esperanto estos universale rekonata kiel necesajo por la civilizita homaro.

Volu doni al Dro. Zamenhof mian dankan respekton, kaj salutu lin de mi kiel unu el la grandaj bonfarantoj de l' homaro. Mi estas, via sincere,

W. T. Stead

• Sro. A. H. Fried telegrafis: “*De la nepaca konferenco en Hago korajn salutojn al la vere paca konferenco en Cambridge!*”

Efektive, la Tria Esperantista Kongreso estis vere paca kongreso. Dudek kvin diversaj nacioj reprezentitaj de 1500 homoj estis harmonie kunigitaj en kora interkonsento. Esperanto alproksimigis reciproke ne nur iliajn korpojn kaj cerbojn, sed precipe iliajn korojn. La obstinaj baroj, disigantaj la homaron, jam estis disbatitaj, kaj inter la tutmonda esperantistaro la bela sonĝo jam efektiviĝis. Kune kun la lingvo Esperanto tiu ĉi nova sento, tiu ĉi interna ideo de l' esperantismo venke trapenetros la tutan mondon!

La Trio por la Tria

La kongreso estis bonege preparita, kaj la kongresanoj ŝuldas koran dankon al la “Trio por la Tria,” al Sro. Kolonelo Pollen, la meritplena prezidanto de la Brita Esperantista Asocio kaj de la kongreso, al Sro. Dro. Cunningham, kies afabla senlaca bonhumoro gajigis ĉiujn, kaj al Sro. Bolingbroke Mudie, kiu prenis sur sin la plej malfacilan antaŭan kaj dumkongresan laboron kaj kies agema vigleco neniam laciĝis.

La Kongresa Urbo

Oni ne povas imagi pli oportunan lokon por la kon-

greso, ol la fama universitata urbo Cambridge. Ĝi estas sufiĉe malgranda, por ke la tuta enloĝantaro povu esti kaptata de tiu nova afero, kiu alkondukis tiom da fremduloj. Tamen pro sia famekonata kaj granda universitato ĝi estas sufiĉe konata kaj respektata ne nur en Anglujo, sed en la tuta mondo, por ke la kongreso atentigu kaj interesigu la tutan civilizitan mondon. La favoro, kun kiu la universitata kaj urba estraroj renkontas Esperanton, certigis efikan oficialan subtenon kaj jam antaŭe promesis belajn sukcesojn; krom tio la vizitantoj en Cambridge povas kolekti amason da belaj kaj instruigaj novaj impresoj, kiujn ili ricevas rigardante la interesajn kolegiojn kun iliaj grandiozaj konstruaĵoj, kun la pentrindaj kortoj kaj la zorge flegataj ĝardenoj, aŭ ĉeestante la karakterizajn anglajn sportludojn. Ankaŭ la ĉirkaŭaĵo prezentas ĉarmajn pejzaĝojn kaj grandan nombron da aliaj interesaĵoj.

Tuta Cambridge estis sub la signo de la kongreso, sub la signo de la Verda Stelo. La stacidomo, la urbdomo kaj la vendeja placo estis bele ornamitaj per flagoj esperantaj kaj diversnaciaj. En la strato antaŭ multaj fenestroj flirtis en la vento la esperanta standardo. “*Oni parolas Esperanton tie ĉi*” anoncis verdaj afiŝoj en multe da magazenoj. Afablaj policianoj sciigis en bona Esperanto la fremdulojn pri la vojo.

La centro de la esperantista vivo estis la urbdomo kaj la vendeja placo. En la urbdomo troviĝis la oficiala kongresa oficejo, la kongresa poŝto, kelkaj skribĉambroj kaj la vasta belega salono, en kiu okazis la agadaj kunsidoj. La granda grenvendejo, lokita post la urbdomo, estis ŝanĝita en solenan festsalonon, kie ĉiutage plimulte ol 700 kongresanoj kunvenis por tag- kaj vesper-maĝo.

Alveno kaj Akcepto de Doktoro Zamenhof

La akcepto, kiun trovis nia majstro kaj lia edziĝo post-tagmeze de lundo, la 12^a de Aŭgusto, estis vere reĝa. La fervoja vagonaro estis atendita de la urbestro, Sro. Stace, kaj granda parto de la urba konsilantaro, de la trianoj kaj multnombra aro da esperantistoj, krom tio de multe da Cambridge'aj enloĝantoj, kiuj estis scivolemaj vidi la “Reĝon de Esperanto.” Korega estis la unua salutado. “Vivu Zamenhof!” “Vivu Sinjorino Zamenhof!” kun entuziasma sincereco kriis la esperantistoj. “Vivu Zamenhof!” ripetis kun ĝoja ekscito la ĉeestanta neesperantista

publiko Poste longa aro da veturiloj moviĝis en la urbon, akompanata de rajdantaj policanoj kaj de taĉmento de la *Legion of Frontiersmen*. La ĝenerala entuziasmo disvastiĝis laŭlonge de la festa strato ĝis la Fitzwilliam Museum. Antaŭ tiu ĉi belega universitata konstruaĵo en antikva stilo alia parto de la kongresanoj formis longajn vicojn, post kiuj dense amasiĝis la Cambridge'anoj. Ree eksonis laŭtaj koregaj salutkrioj.

En la vastaj ĉambregoj de la Fitzwilliam Museum Rev. E. S. Roberts, vickanceliero de la universitato, salutis kaj afable akceptis Dron. Zamenhof kaj la kongresanaron. La miloj da diversnaciaj homoj, kiuj en festaj vestoj, en multkoloraj akademiaj roboj kaj militistaj uniformoj trapaŝis la ĉambregojn de la muzeo prezentis belegan, kosmopolitan vidaĵon. Per komuna kanto de la himno, "En la Mondon Venis Nova Sento," la grandioza akcepta festo finiĝis.

La Malferma Kunsido

La solena malferma kunsido de la kongreso okazis lundon, la 12'an de Aŭgusto vespere en la Nova Teatro, kiu estis plenigita ĝis la lasta loko. Kiam la kurteno leviĝis unuafoje, la scenejo estis okupita de 60 feste vestitaj sinjorinoj, kiuj kantis la esperantan himnon, "La Espero," sub la majstra direktado de Sro. C. B. Rootham. Ĉe la dua leviĝo de la kurteno neforgesebla bildo prezentiĝis al la ĉeestantaro. Ĉe granda verde kovrita tablo en la antaŭo sidis la Majstro kaj Sinjorino Zamenhof; dekstre la urbestro, Sro. Stace, lia edzino kaj la Triano, Sro. Mudie; maldekstre la aliaj Trianoj, Kolonelo Pollen kaj Dro. Cunningham. Flanke kaj malantaŭe troviĝis la ceteraj eminentuloj en Esperantujo kaj la delegitoj de 25 diversaj nacioj. Kun grandega entuziasma aplaŭdo la kongresanoj salutis sian majstron, kiu danke kliniĝis al ĉiuj flankoj.

Sro. Schneeberger, la prezidanto de la dua kongreso, malfermis la kunsidon. Li transdonis la prezidentecon al Kolonelo Pollen. La elekto de Kolonelo Pollen kiel prezidanto estis aprobita, kaj laŭ lia propono oni elektis kiel vic-prezidantojn, Sro. H. B. Mudie kaj Dro. Cunningham.

Poste la urbestro, Sro. Stace, kaj lia edzino kore salutis Dron. Zamenhof kaj la kongreson per afablaj vortoj en Esperanto.

Nun Kolonelo Pollen stariĝis, kaj en la nomo de la Brita Esperantista Asocio li transdonis al Dron. Zamenhof

belege desegnitajn blazonflagojn, kiun tiu ĉi akceptis en la nomo de la tuta esperantistaro. La blazonflago estos uzata ĉe ĉiuj sekvontaj internaciaj esperantistaj kongresoj, kaj novaj nomoj estos aldonataj al la ĝisnunaj: Boulogne, Genevo, Cambridge.

Plena, atenta silento ekregis kiam la reĝo de la festo, Dro. Zamenhof, leviĝis por legi sian ĉiujaran gravan paroladon. Tiuj ĉi kongresaj paroladoj de nia majstro ĉiujare donas al ni novan instigon, novan rekurigon, por ke ni ne laciĝu en nia laboro kaj ne perdu la idealan vidpunkton. Tiufoje li parolis pri la esenco, la ideala celo de niaj kongresoj. Jen la plej gravaj partoj el la genia parolado:

La Parolado de Zamenhof

Samideanoj! La fakto, ke ni kongresas nun en glora universitata urbo de Granda Britujo, havas grandan signifon. La kontraŭuloj de nia ideo konstante ripetadis al ni, ke la angle parolantaj popoloj neniam al ni aliĝos, ĉar ne sole ili malpli ol ĉiuj aliaj popoloj sentas la bezonon de lingvo internacia, sed por ili la fortikiĝado de lingvo internacia estas rekte malutila, ĉar tia lingvo konkurados en la mondo antaŭ ĉio kun la lingvo angla, kiu celas fariĝi internacia. Kaj tamen rigardu, kiel forte eraris niaj kontraŭuloj! Rigardu, kiel multope jam aliĝis al ni la britoj, kiuj tiel nevolonte lernas aliajn lingvojn, krom sia nacia; rigardu, kun kia amo ili preparis nian kongreson kaj en kia granda nombro ili aperis, por deziri al ni bonvenon! Tio ĉi montras antaŭ ĉio, ke la homoj komencis jam kompreni, ke lingvo internacia estas utila ne sole por popoloj malfortaj, sed ankaŭ por popoloj fortaj; sed tio ĉi montras alian aferon, multe pli gravan—ke la homoj vidas en la esperantismo ne sole aferon de egoisma oportuneco, sed gravan ideon de intergenta justeco kaj frateco, kaj al tiu ĉi ideo volas servi la noblaj homoj de ĉiuj popoloj, tute egale, ĉu iliaj popoloj estas fortaj aŭ malfortaj, kaj ĉu la intergenta justeco estas por ili profita aŭ malprofita. Ni scias, ke la plimulton de niaj britaj samideanoj alkondukis al ni la interna ideo de la esperantismo, kaj tial ni tiom pli ĝoje esprimas al niaj britaj amikoj nian koran dankon. La Kembriĝanoj akceptas nin hodiaŭ ne kiel komercistojn, kiuj alportas al ili profiton, sed kiel apostolojn de ideo homara, kiun ili komprenas kaj ŝatas. Koran dankon al la Kembriĝanoj; koran dankon al la glora Kembriĝa uni-

versitato, kiu pruntis al ni siajn ĉambrojn; koran dankon al la Kembriĝa urbestro, kiu gastame zorgis pri nia bono. Ni kore salutas vin, granda brita popolo, ni plej respektas vian altan reprezentanton, Lian Reĝan Moŝton. Vivu la reĝ' al vi, tre longe vivu li, gardu lin Di'!

Samideanoj! Antaŭ tri semajnoj finiĝis ĝuste dudek jaroj de la tago, kiam aperis publike la unua libro pri la lingvo Esperanto. Multaj el vi konas la historion de la lastaj dek jaroj de la esperantismo, kiam la longe dormintaj semoj komencis doni la unuajn trunketojn; sed tre malmultaj el vi konas la historion de la unuaj dek jaroj, kiuj konsistis el senfina, ŝajne tute sensukcesa semado. La historio de la esperantismo iam rakontos al vi pri ĉiuj tiamaj semantoj.

Nun nia afero staras forte. La glacia tavolo da antaŭjuĝoj de la mondo estas rompita, kaj nia afero kreskas regule kaj senhalte. Ĉiu jaro potence pligrandigas niajn fortojn, kaj ni iras al nia celo jam kun plena trankvileco. Centoj da miloj da radikoj kaj radiketoj subtenas nian arbon, kiu jam ne timas la venton. La naturo, kiu longan tempon batalis kontraŭ ni, batalas nun por ni, ĉar tiu sama forto de inercio, kiu longan tempon terure malhelpis ĉiun nian paŝon, ĝi mem nun ŝovas nin antaŭen. Eĉ se ni volus nun halti, ni jam ne povus.

Mi transiras al la vera temo de mia hodiaŭa parolado. Mi volas paroli al vi hodiaŭ pri la esenco kaj celo de niaj kongresoj. Se ni konscios bone la esencon kaj celon de niaj kongresoj, tiam ni venados al ili kun ĉiam freŝa kaj neniam malfortiĝanta entuziasmo, kiel homoj, kiuj klare vidas antaŭ si la belan celon, al kiu ili iras. Ni kunvenas ĉiujare el ĉiuj partoj de la mondo, por havi la ĝojon vidi samideanojn, por premi al ili la manon, por varmigi en ni per reciproka renkontiĝo kaj kunvivo la amon kaj entuziasmon por la ideo, kiun la esperantismo en si enhavas. Kiel la antikvaj hebreoj tri fojojn ĉiujare kunvenadis en Jeruzalemo, por vigligadi en si la amon al la ideo mono-teisma, tiel ni ĉiujare kunvenas en la ĉefurbo de Esperantujo, por vigligi en ni la amon al la ideo esperantisma. Kaj tio ĉi estas la ĉefa esenco kaj la ĉefa celo de niaj kongresoj.

En Esperantujo regas ne sole la lingvo Esperanto, sed ankaŭ la interna ideo de la esperantismo; en Esperantujo regas ne sole la oficiala ĝenerala esperantismo—tie regas ankaŭ io alia, io ĝis nun ankoraŭ ne precize formulita,

sed tre bone sentata de ĉiuj esperantujanoj—tie regas la verda standardo!

Kio estas la verda standardo? Ĝi estas por ni io sankta, ĝi estas la signo, sub kiu ni marŝas al nia paca batalado; ĝi estas la voĉo, kiu konstante memorigas al ni, ke ni laboras por Esperanto nur tial, ĉar ni esperas, ke pli aŭ malpli frue, eble post multaj jarcentoj

Sur neŭtrala lingva fundamento,
 Komprenante unu la alian,
 La popoloj faros en konsento
 Unu grandan rondon familian.

Ni konstante ripetadis, ke ni tute ne deziras nin enmiksi en la internan vivon de la gentoj, sed ni deziras nur krei ligantan ponton inter la gentoj. La devizo de la ideaj esperantistoj, neniam ĝis nun precize formulita, sed ĉiam klare sentata, estas: “Ni deziras krei neŭtralan fundamenton, sur kiu la diversaj homaj gentoj povus pace kaj frate interkomunikiĝadi, ne altrudante al si reciproke siajn gentajn apartaĵojn.”

Por formuli precize ĉiujn detalojn de la dirita devizo, ne venis ankoraŭ la tempo; ili formuliĝos per si mem, iom post iom, per nia ĉiujara kunvenado kaj kunvivado. Mi volis nur atentigi vin, ke niaj kongresoj, farataj sub la signo de la verda standardo, estas ne sole kongresoj de la lingvo Esperanto, sed ankaŭ de la interna ideo de la esperantismo.

Vi ofte aŭdis pri la neŭtraleco de niaj kongresoj. Jes, neŭtraleco estas la ĉefa principo de niaj kongresoj; sed oni devas ĝuste kompreni la sencon de tiu ĉi neŭtraleco. Neŭtraleco ekzistas en ĉiuj internaciaj kongresoj; sed dum tie la neŭtraleco estas simple afero de takto, ĉe ni ĝi estas la ĉefa principo; ĉe ni la neŭtraleco, aŭ pli ĝuste la neŭtrala ligo de la intergentaj rilatoj estas la tuta enhavo, la tuta celo de niaj laboroj. Ĉio, kio, neniun ofendante, povas krei pacan ponton inter la popoloj, tio ne sole ne devas esti timeme evitata en niaj kongresoj, sed kontraŭe, ĝi devas esti ĝuste la esenco de niaj kongresoj, ĉar ĝi apartenas al la verda standardo. Ĉio, kio kondukas al rompadado de la muroj inter la gentoj, apartenas al nia kongreso. Ĉio, kio servas al la fratigado de la gentoj kaj al la rompadado de la malamikaj muroj inter la popoloj—se ĝi nur ne enmiksas sin en la internan vivon de la gentoj—apartenas al la verda standardo.

Karaj amikoj! Nia kongreso devas esti simple kongreso de esperantistoj, kaj kondiĉe ke ĝia programo estu preparita laŭ la kongresa regularo, ĝi devas resti tute libera kaj konformiĝi ĉiufoje al la opinioj kaj deziroj de la plimulto de la kongresanoj. Sed ĉu vi aprobos mian opinion aŭ ne, ĉu vi volos labori laŭ la postuloj de la verda standardo, aŭ ne, mi ne dubas, ke en la profundeco de viaj koroj, vi ĉiuj sentas la verdan standardon, vi ĉiuj sentas, ke ĝi estas io pli, ol simpla signo de lingvo. Iom post iom Esperantujo fariĝos edukejo de la estonta interfratigita homaro, kaj en tio ĉi konsistos la plej gravaj meritoj de niaj kongresoj.

Vivu Esperanto, sed antaŭ ĉio vivu la celo kaj la interna ideo de la esperantismo, vivu la frateco de la popoloj, vivu ĉio, kio rompas la murojn inter la gentoj, vivu, kresku kaj floru la verda standardo!

Post la vortoj de la majstro la entuziasmo atingis sian plej altan gradon. Longtempe daŭradis la ĝoja kaj sincera aplaŭdado.

Sekvis nun la paroloj de la multenombraj delegitoj. Unue la oficiala reprezentanto de la belga registaro, Sro. Leŭtenanto Cardinal, esprimis en la nomo de Belgujo korajn salutojn al la kongreso kaj certigis la ĉeestantojn pri la bonvolo kiun montris precipe la belga militistaro por Esperanto.

Poste oni aŭskultis la salutojn, kiujn la delegitoj transdonis al Dro. Zamenhof kaj al la kongreso en la nomo de siaj samlandanoj. Jen la nomo de la reprezentitaj landoj kaj de iliaj delegitoj:

Francujo, de Beaufront; Rusujo, Lojko; Svisujo, de Saussure; Venezuelo, Nolcan; Tunizio, Gelula; Svedujo, Ahlberg; Siberujo, Frankel; Polujo, Bein; Urugvujo, Munos; Norvegujo, Schibbye; Malto, Lambert; Unuigitaj Ŝtatoj, Weiss; Italujo, Junck; Islando, Constance; Irlando, Fournier; Holandujo, Uitterdijk; Katalanujo, Pujula; Hispanujo, Guinart; Gibraltaro, Edwards; Germanujo, Mybs; Danujo, Borberg; Britujo, Rhodes; Skotlando, Warden; Belgujo, Van der Beist; Hungarujo, d'Orczy; Aŭstrujo, Simon; Bohemujo, Cejka; Kanado, Beauchemin.

Fine la tuta ĉeestantaro kantis starante: "Savu la reĝon Di'!"

La Agadaj Kunsidoj

La agadaj kunsidoj de la kongreso okazis de mardo, la 13'a, ĝis vendredo, la 16'a de Aŭgusto antaŭtagmeze en la granda ĉambrego de la urbdomo. Malgraŭ la bela vetero la plejmulto de la kongresanoj preferis ĉeesti tiujn ĉi gravajn kunvenojn, aŭskultis kun pacienca intereso la multnombrajn kaj parte longtempajn diskutadojn kaj decidojn; Sur la estrado sidis la samaj personoj, kiujn ni vidis ĉe la malferma kunsido en la scenejo. En la mezo Dro. Zamenhof kaj la Trianoj, ĉirkaŭe la diversnaciaj delegitoj. Sro. Mudie majstre prezidis la kunsidojn; Sro. Moch kaj Sro. Chavet zorgis pri la oficiala protokolo, helpataj de franca fraŭlino, kiu per stenografa maŝino lerte kaj facile fiksas ĉiujn parolojn. En la malantaŭo la nova blazonflago estis starigita.

Ni ne povas detale raporti pri ĉio, kio estas parolita, diskutita kaj decidita en la agadaj kunsidoj, kaj devas rimarkigi nur tion, kio ŝajnas al ni precipe grava kaj interesa.

Mardo, la 13a de Aŭgusto.—Sro. Chavet legis la raporton pri la progresoj de Esperanto dum la pasinta jaro. En ĉiuj partoj de la mondo nia afero ĝojige kreskis, precipe en Ameriko. Sro. Montrosier, redaktoro de *Tra la Mondo*, parolas pri la stato de Esperanto ĉe la Ruĝa Kruco. Sro. Rene Deshays atentigas pri la graveco de Esperanto por la internaciaj rilatoj de la socialistoj.

Merkredo, la 14a.—En tiu ĉi kunsido plej grandan intereson ekscitas Sro. Mayor, okdektrijara, famekonata profesoro de la latina lingvo ĉe la Cambridge'a universitato. La maljuna sinjoro diras per laŭta kaj viva voĉo kelkajn favorajn vortojn por Esperanto kaj estis kore aplaŭdata. Poste oni diskutas pri la ĉiujara festo de Esperanto kaj akceptas la principon de la neceseco de tiu ĉi festo, ne ankoraŭ decidante certan tagon. La kongreso aprobas la kreon de Esperantista Marista Ligo, kaj admonas insiste la havenajn grupojn, por ke ili helpu plej eble la agadon de tiu ligo.

Ĵaŭdo, la 15a.—Sro. E. K. Harvey el Ameriko legas leteron de la redaktoro de la *North American Review*, kiu invitas la esperantistan kongreson al Ameriko en la jaro

1908. Post tio Sro. Dro. Mybs sciigas la ĉeestantojn, ke ĵus la germanaj esperantistoj en aparta kunsido decidis, inviti la kongreson al Germanujo. La difinita decido estis prokrastata al la venonta tago.

Vendredo, la 16a de Aŭgusto.—La ĉefa rezultato de la kvara kaj lasta agada kunsido estas la akcepto de Germanujo kiel kongreslando en 1908. Sro. Dro. Mybs dankas per koraj vortoj pro tiu ĉi decido, kaj promesas en la nomo de la germanaj esperantistoj, ke ili aranĝos la kongreson kiel eble plej bone, por ke ĝi estu inda je la antaŭaj kongresoj. Poste oni esprimas la dankon al la amerikanoj pro ilia invito, kaj Sro. Mudie priparolas la eblecon kaj utilecon de du kongresoj en ĉiu jaro—la unu en Ameriko, la alia en Eŭropo. Kolonelo Pollen sciigas, ke Lord Roberts, eksĝeneralo de la brita armeo, akceptis la honoran prezidantecon de la Brita Esperantista Asocio. Sro. Rektoro Boirac raportas pri la laboroj de la lingva komitato. Estas decidite, presi oficialan liston de la radikaj vortoj, teknikajn vortarojn, k. t. p. Laŭ propono de Sro. de Beaufront la kongreso esprimis oficiale sian dankon al la urbestro kaj la loĝantaro de Cambridge pro ilia gastameco, same al Sro. Hoveler, kiu per siaj Ĉefeĉ-slosiloj mirinde helpis la disvastigon de Esperanto. Fine Sro. Kolonelo Pollen persone dankas Sron. Mudie pro liaj senĉesaj penadoj dum la kongreso, kaj ĉiujn, kiuj helpis la aferon.

La Ferma Kunsido

La lasta oficiala kunsido de la kongreso okazis sabaton, la 17^a de Aŭgusto antaŭtagmeze. Oni raportas, ke nun jam ekzistas 203 esperantistaj konsulejoj. Dro. Mybs diras, ke precipe por Germanujo la vortoj “informisto” kaj “informejo” estas pli taŭgaj, ol “konsulo” kaj “konsulejo.” La kongreso konsentas. Prof. Rene de Saussure legas la raporton de la Internacia Scienca Oficejo. Poste la kongreso aprobas decidon, proponitan de la Internacia Scienca Asocio, kies anoj opinias, “ke la uzo de sistemo de decimala helpa mono estus tre utila, kaj esprimas la deziron, ke ĉiuj esperantistoj provu tiun uzon.”

Kun granda aplaŭdo oni ree salutis Sron. Prof. Mayor, kiu direktis entuziasmajn vortojn al la kongreso:

“Pli juna fariĝas la koro, pli libera per venkita malĝojo. En tiuj ĉi tagoj ni vidis miraklon, miraklon de Pentekosto. Ĉiuj popoloj komprenante unu la alian, riparante la malfeliĉaĵon de Babelo faras unu grandan rondon famili-

an. Tie ĉi la poeto Ovidio ne bezonus plendi: 'Tie ĉi mi estas barbaro, ĉar nenio komprenas min.' Miraklon de kompatemeco: sub la patra zorgo de Prof. Cart blinduloj legas, vidas per la fingroj, per la oreloj. Tial vivu, kresku, floru la nove eltrovita lando Esperantujo kune kun sia nova Kristoforo Kolumbo, kaj la tuta esperantistaro."

Dro. Zamenhof en siaj finaj paroloj diris, ke la kongreso ĝoje atingis sian celon, ke ĝi montris al la mondo grandiozan manifestadon, ke ĝi denove kunfratigis la diversnaciajn esperantistojn, ke ĝi fortigis kaj potencigis la esperantismon.

La Ekspozicio

En supra ĉambrego de la urbodomo Prof. Bourlet estis aranĝinta belan ekspozicion, kiu estis plej grava pro tio, ĉar ĝi entenis ĉiujn esperantajn librojn aperintajn de la komenco ĝis nun. Saman intereson ekscitis la ekspozicio de Prof. Cart, la patra zorganto de la blinduloj. Ĉiuj iloj, kiuj plifaciligas kaj plibeligas la vivon de la malfeliĉuloj, ekz. libroj en Braille-reliefpunktoj, skribmaŝinoj, poŝhorloĝoj, estis elmetitaj. En la ekspozicia ĉambro fariĝis ankaŭ viva disvendado de esperantaj libroj, memoraĵoj, k. t. p.

Internacia Scienca Asocio Esperantista

Jam dum la Geneva kongreso okazis kunveno de sciencamantoj, kiuj provizore fondis la supre cititan asocion. Generalo Sebert estis elektata kiel prezidanto, Prof. Bourlet kiel sekretario. Unue oni akceptis deklaron, per kiu oni esprimis la deziron ke: 1—La scienculoj konstante uzu la lingvon dum siaj kongresoj. 2—La gravaj internacie disvastigitaj sciencaj gazetoj akceptu artikolojn redaktitajn en Esperanto kaj plie aldonu al ĉiu artikolo redaktita en nacia lingvo resumon en Esperanto montrantan ĝian enhavon.

Oni decidis kolekti grandan nombron da subskriboj, kaj precipe la subskribojn de eminentuloj.

Dank' al la fervoraj klopodoj de Prof. Rene de Saussure fondiĝis en Genevo ankoraŭ en la jaro 1906, la Internacia Scienca Oficejo Esperantista, kiu sukcesis kolekti plimulte ol 700 subskribojn de la dirita deklaro, kaj kiu eldonas de lasta Januaro la Internacian Sciencan Revuon, aperintan jam de 1905 en Parizo.

Nun, dum la Cambridge'a kongreso fariĝis la solena kaj oficiala fondo de la Internacia Scienca Asocio Esperan-

tista en la diskutejo de la "Union Society." Dro. Zamenhof mem ĉeestis kiel honora prezidanto. Kiel prezidanto por la unua jaro estis elektata unuvoĉe Prof. A. Schmidt, direktoro de la reĝa magnetaj observejoj en Potsdam, profesoro ĉe la Berlina universitato kaj prezidanto de la Berlina Esperantista Grupo. Kiel vicprezidantojn oni elektis la faman fizikiston, Prof. Thompson (Cambridge), kaj Prof. Benoit (Paris), direktoron de la internacia oficejo por mezuriloj kaj peziloj. En la komitato troviĝas interalie Generalo Sebert, Prof. Bourlet, Dro. K. Bein. Ĉefsekretario estas Prof. Rene de Saussure, direktoro de la Internacia Scienca Oficejo Esperantista.

Tiu ĉi Scienca Asocio, al kiu apartenas plej famaj scienculoj, helpas tre efike por la definitiva venko de Esperanto. Ĉar nun la lingvo jam trovis la plej bonan kaj fervoran subtenon de la sciencularo, ĝiaj sciencaj kontraŭuloj ne plu povos malhelpi ĝin.

Aliaj Specialaj Kunvenoj

Pri la ceteraj specialaj kunvenoj ni povas doni nur tre mallongan resumon, kvankam multe da ili estis tre gravaj kaj ĉiuj helpis disvastigi la uzadon de la lingvo por la plej diversaj celoj.

Belegan rezultaton atingis konferenco diskutanta la esperantan tradukon de la Biblio. Oni konsentis, ke por la traduko nur estas uzablaj la originalaj tekstoj. Provizora komitato estas elektata konsistanta el la Pastroj Rust, Schneeberger, Peltier, kiuj reprezentas tri diversajn konfesiojn, nome la anglikanan, la protestantan kaj la katolikan. Belega ekzemplo de interkonsento! Sro. Evsteveieff rimarkigas, ke nepre estos necesa organo, en kiu oni pri-traktos la multnombrajn problemojn kaj interŝanĝos la opiniojn. Li mem estas preta eldoni por tiu ĉi celo monatan gazeton. Tiun ĉi grandaniman decidon oni akceptas kun kora danko.

Krom la fondo de la Internacia Scienca Asocio ni povas registri la fondojn de jenaj societoj:

Societo Internacia de Esperantistinoj por la Protektado de la Virinoj. Kvarcent esperantistinoj ĉeestis. Sinjorino Zamenhof akceptis la honoran prezidantecon.

Internacia Muziksocieto. La fondanta komitata konsistas el Sro. de Menil, Dro. Hanauer, Fino. Schafer, Sro. Bendix.

Marista Ligo, kiu klopodas disvastigi Esperanton inter la maristaro.

Krom tio havis specialajn kunsidojn: kuracistoj, dentistoj, farmaciistoj, juristoj, komercistaj, ĵurnalistoj, fra-masonoj, liberpensuloj, socialistoj, studentoj de nova vivo kaj aliaj.

La Esperanto-Ĵurnalo organizis kunvenon, en kiu oni priparolis la nunan staton kaj la celojn de la esperantaj oficejoj, konsulejoj, k. t. p. Oni atingis ĝojigan decidon rilate al la organizo de la konsuloj.

Komprenoble ankaŭ la samnaciaj esperantistoj havis siajn apartajn kunvenojn.

La Esperantaj Diservoj

Esperanto ne nur taŭgas por la ĉiutagaj bezonoj de la homoj, ne nur por la negocaj kaj sciencaj aferoj; ĝi povas esprimi kaj komuniki la plej profundajn sentojn de la homa animo tiel bone, kiel ĉiu ajn nacia lingvo. Pruvo de tio estis la esperantaj diservoj, kiuj okazis dimanĉon, la 11^an de Aŭgusto. Matene en "Great St. Mary's" Preĝejo fariĝis la unua plena diservo en Esperanto laŭ la anglikana diservordo. En konsento kun la Ĉefepiskopo, la Episkopo de Ely permesis la diservon kaj aprobis la esperantan tradukon de la anglikana preĝlibro, bonege faritan de Pastro J. C. Rust. La preĝejo estis plenigita de ĉirkaŭ mil diversnaciaj esperantistoj, kiuj kantis kun religia entuziasmo la himnojn, kaj aŭskultis kun sinĉonema atento la predikon de Pastro Rust. Laŭ Epistolo al la Efesanoj (ĉapitro 1, 9) li parolis pri la nova ordo en la pleneco de tempoj, pri la unueco de ĉiuj nacioj, la unueco de la homa historio kaj la unueco de ĉiuj formoj kaj specoj de sciado.

La sama entuziasma pieco regis la kunvenintojn vespere en la Emanuel Kongregacia preĝejo, kie okazis katolika diservo. Pastro Richardson legis telegramon, senditan el Romo de Mgr. Giambine, kaj entenantan la papan benon de la Sankta Patro. Poste li predikis pri tiu tempo feliĉa, kiam la tuta homaro estos vere unu familio da gefratoj havante unu Patron kaj la saman religion; unuvorte, kiam la tuta homaro nur estos unu ŝafaro sub unu paŝtisto (Ev. Joh. 10, 16). Tiun ĉi katolikan diservon beligis diversaj solaj kaj ĥoraj kantoj.

Dua anglikana diservo fariĝis ankaŭ dimanĉon vespere en la Emanuel Kongregacia preĝejo. Pastro Selbie parolis

pri la esenco de la kristaneco, pri la kristana unueco, pri la komuna etikaj idealoj de la diversaj eklezioj. "Estas bonege, ke la diversaj homaj pensoj estu esprimataj per la vortoj de unu lingvo, kiun komprenas ĉiuj. Tiel ekzistas morala Esperanto-lingvo de l' animo, kiuj por ĉiuj estas la sama, la lingvo de bonaj faroj kaj de sankta vivo."

Festoj Kaj Amuzaĵoj

Estas malfacile priskribi per kelkaj vortoj la multenombrajn festajn aranĝojn, kiuj estis dismetitaj en la kongresa programa. La vesperoj de mardo kaj merkredo ree unuigis la plimulton de la kongresanoj en la nova teatro. En la unua teatra kunveno ni aŭdis bonajn muzikaĵojn, kantadojn kaj deklamadojn. Poste Sroj. Page, Ford kaj Hulme ludis la amuzigan komedieton de John Maddison "Boks kaj Koks," tradukitan de Stewart, kaj ili akiris koran aplaŭdodon de la ĉeestantaro. La dua teatra kunveno komenciĝis per tre interesa parolado kun lumprojekcioj, farita kun mirinde bela kaj klara voĉo de Baronino de Menil pri la morala edukado de la popola infano. Prof. Cart efike rakontis profundsencan fablon. Sro. Dore kun aktora lerteco parolis humorplenan monologon. Post aliaj kantoj kaj deklamoj sekvis la prezentado de la komedio, "Bardell kontraŭ Pickwick," de Dickens. Kvankam la aktoroj apartenis al naŭ diversaj nacioj, tamen la ludado estis tute unueca kaj denove pruvis la internaciecon de Esperanto. Inter la aktoroj ni rimarkis ankaŭ la Trianojn Srojn. Pollen, Cunningham and Mudie.

Alian paroladon kun lumprojekcioj faris Kolonelo Pollen mardon vespere pri sia vojaĝo al Hindujo kun la standardo. Kun intereso la ĉeestantoj aŭskultis la vivplenajn priskribojn de tiu ĉi nova apostolo, kiu portis la evangelion de Esperanto en la plej malproksimajn partojn de la mondo.

Vendredon, la 16'an de Aŭgusto posttagmeze la kongresanoj kunvenis en la belega Ĝardeno de la Fratuloj, kie la Esperantistoj afable estis salutataj de la provincestro kaj Vicgrafino Clifden, de la Ĉefekonomo de la urbo, Sro. Harding kaj lia edzino kaj de la urbestro kaj urbestrino de Cambridge, Sro. kaj Sino. Stace. Ĉe muziko kaj sakfajfado de la Skota Gvardio, oni gaje promenadis sub la altaj arboj kaj sur la freŝverdaj herbejoj de la ĝardeno.

La saman vesperon okazis la granda nacivesta balo en la urbdomo kaj la grenvéndejo, kiuj estis kunligitaj per

tendo. Tiu ĉi balo prezentis grandiozan, vere internacian, vivan pentraĵon. Inter la plej pentrindaj naciaj vestoj de skotlandaj, holandaj, alsatiaj, bohemiaj, hungaraj, tirolaj kaj alilandaj sinjorinoj kaj sinjoroj, miksiĝis belaj multekoloraj militistaj uniformoj, francaj kaj anglaj universitataj roboj. Oni multenombre partoprenis la dancadon, aliaj observis la multekoloran, ĉiam moviĝantan homamason de la estrado. La komunaj dancoj alternis kun prezentadoj de interesaj naciaj dancoj. Rapide flugis la horoj kaj nur post la dua nokte finiĝis la bela festo.

Sabaton, la 17'an de Aŭgusto, La Revuo organizis feston por la disdono de premioj de sia literatura konkurso. Dro. Zamenhof mem prezidis kaj faris paroladon. Post diversaj muzikaĵoj, deklamadoj kaj kantoj, post paroladoj de Prof. Bourlet kaj Rektoro Boirac la premioj ricevis la premiojn el la mano de la majstro.

Bedaŭrinde ni ne havas sufiĉe da spaco por daŭrigi nian raporton. Ni ne povas priskribi la ekskursojn en la belan ĉirkaŭaĵon, la karakterizajn sportludojn kaj turnirojn, kiuj okazis dum la kongresa semajno, kaj kiujn precipe la ne-anglaj esperantistoj vizitis kun granda intereso. Ni povas nur aludi la afablan akcepton, kiun la esperantistoj trovis en la diversaj universitataj kolegioj.

Kun granda, sincera dankemeco la kongresanaro adiaŭis la belan kaj gastaman urbon Cambridge. Certe nia majstro agis en konsento kun ĉiuj kongresanoj, kiam li, jam mardon, la 13'an de Aŭgusto, skribis jenan leteron, por danki ĉiujn, kiuj kunhelpis por la bela sukceso de la kongreso :

Bull Hotel, Cambridge, 13'an de Aŭgusto, 1907.

En la nomo de la esperantistoj mi permesas al mi esprimi mian plej koran dankon al la urbo Cambridge, kiu tiel gastame nin akceptas, kaj precipe al Sinjoro la Urbestro kaj al Sinjorino la Urbestredzino kaj al la reprezentantoj de la Cambridge'a universitato. La granda honora akcepto, kiun ili faris por ni, estas tre kuraĝiga por tiu ideo, kiun ni reprezentas. Mi esperas, ke mi ne agos kontraŭ la deziron de la kongresanoj se mi esprimas publike la koran dankon de ni ĉiuj por la organizantoj de la kongreso: Dro. Kolonelo Pollen, Sinjoro Dro. Cunningham kaj la senlaca tre multe laborinta kaj pri ĉio bonege zorginta Sinjoro H. Bolingbroke Mudie.

L. L. Zamenhof.

Post la neforgeseblaj Cambridge'aj tagoj la pli granda parto de la kongresanaro ne ankoraŭ disiĝis, sed restis kune por partopreni la festajn aranĝojn en Londono, fari-

tajn de la tiea esperanta klubo, kaj la grandan akcepton en la londona urbodomo. Poste granda nombro da esperantistoj vizitis la plej belajn partojn de Granda Britanujo, unuj Kimrujon, gvidataj de Sro. Mudie, aliaj Skotlandon gvidataj de Sro. Page. Ankaŭ la londonaj tagoj kaj ekskursoj prezentis belegajn okazintaĵojn kaj novajn sukcesojn de nia lingvo.

O. L.

RUGULOJ EN CAMBRIDGE

Je la 13'a, 14'a, 15'a kaj 16'a la ruĝuloj tenis kunsidojn en Cambridge. La spaco mankas por plena raporto pri la tieaj tre interesaj faroj. La plejgrava afero, laŭ la raporto presita en la Internacia Socia Revuo, estis la sendo de cirkulero protestanta kontraŭ la malakcepto de Esperanto, kiel unu el la oficialaj lingvoj de la internacia socialista kongreso en Stuttgart. Jen la teksto:

Cirkulero sendita de la Dua Universala Kongreseto de Ruĝuloj Esperantistaj al la Deligitoj de la Socialista Kongreso en Stuttgart:

Kiam unu registaro, precipe registaro de la tipo rusa aŭ turka, malhelpas kaj eĉ absolute malpermesas disvastigon de lingvo internacia en regataj de ili landoj, ili agas tre prudente kaj tre konforme al sia esenca naturo. La lingvo, kiu detruas aŭ almenaŭ malfortigas limojn, la lingvo, kiu efektivigos internaciecon de popoloj, por ili estas signo de morto aŭ almenaŭ de grava ŝanĝiĝo.

Ni tion komprenas kaj pri tio ni ne miras. Kontraŭe, ni mirus se estus alie.

Sed ni efektive miras kaj sentas doloron, kiam ni vidas, ke la partio, kiu sin nomas "internacia," la partio, kiu estis naskita per la epokfaranta alvoko: *Proletarioj de ĉiuj landoj, unuiĝu!* kiam tiu partio ne sole ne zorgas pri la demando de lingvo internacia, sed eĉ malhelpas ĝin, laŭforte kontraŭbatalas sub diversaj pretekstoj kaj laŭ diversaj manieroj.

Ĉu la devizo, "Proletarioj de ĉiuj landoj, unuiĝu!" fariĝas tiel same sensignifa ornamo de oficiala konstruaĵo de partio, kiel la devizo "Libereco, egaleco, frateco" fariĝis nun nur fantomoj de francaj regnaj institucioj?

Estus tre malbona signo por la interna vivo de socialista partio, se ĝi rilate al la demando pri lingvo internacia konservus la saman kaŝitan malamikan pozicion, kiun okupis ekzemple la rusa registaro ĝis la lasta ekstera malvenko.

Estus pli konforme al la indo kaj ideo de la "Internacia" Laborista Socialista Partio, se ĝi en la nomo de du grandaj principoj—internacieco kaj demokrateco—prenus sur sin la devon kaj honoron akcepti la nunan internacian lingvon por efektivigi la belan sonĝon de la demokrata, kontraŭprivilegia kaj kontraŭŝovinista homaro.

LA REĜO DE ELFOJ

El W. Goethe tradukis esperanten por *Pola Esperantisto* A. Grabowski

*Kiu rajdas tra nokto, kun vento pro l' vet' ?
Tio estas la patro kun sia filel' ;
La infanon li bone per brak' ĉirkaŭprenas,
De malvarmo gardante, ĉe brusto lin tenas.*

“Kial kaŝas, filel', la vizaĝon vi time?”
“Ĉu ne vidas vi, patro, elfreĝon proksime ?
Elforeĝon kun longa trenajo kaj kron' ?”
“Mia filo, ĝi estas nebula nur zon'.”

“Infano amata, ho venu al mi !
La plej belajn ludetojn mi ludos kun vi ;
Apud bordo jen brilas floretoj koloraj,
Kaj ĉe mia patrino vestaĵoj la oraj.”

“Ĉu vi tute ne aŭdas, ho mia patreto,
Kion al mi promesas elfreĝ' en sekreto ?”
“Trankviligu, infano, kaj kredu al mi ;
Murmuretas nur vento en velka foli' ”

“Bela knab' , al mi venu, tre bone vi fartos ;
Miaj junaj filinoj karese vin vartos ;
La filinoj-mastrinoj en danca rondform' ,
Balancante, kantante vin lulos al dorm' .”

“Ĉu ne vidas vi tie, patret' mia kara,
De elfreĝo filinojn en loko malklara ?”
“Mia filo, fileto, mi vidas precize ;
La maljunaj salikoj prezentas sin grize.”

“Mi vin amas, belul' ! ekposedi deziras,
Do mi uzos perforton, ĉar mem vi ne iras !”
“Mia patro, li kaptas, li prenas min for !
Al mi faris elfreĝo doloron je l' kor' !”

*Frostotremas la patro, akcelas rapidon,
En la brakoj li tenas ĝemantan la idon ;
Li alrajdas penege al hejma la kort' ;
En la brakoj l' infanon pacigis la mort' .*

AFEROJ ESPERANTISTAJ

The Illinois Esperanto Association estas la nomo de nova federacio, konsistanta el ĉiuj la kluboj esperantistaj en la grand-loĝantara ŝtato Illinois, en kiu estas la urbego Chicago. Je la 16'a de Oktobro kunvenis delegitoj el la kluboj en Elĝin'on kaj elektis la jenan estraron: Prezidanto, Dro. Walter H. Fox, el Chicago; vic-prezidanto, A. G. Beaman, el Chicago; sekretario-kasisto, E. C. Reed, el Rockford; konsilantoj, Doktorino Clara Todson, el Elĝin, kaj D. Whittlesea, el Rockford.

Ĉikaga Esperantista Societo tenis regulan kunsidon en Ĉambro 38'a, Etaĝo L, Great Northern Hotel, ĵaŭdon, la 17'an de Oktobro, vespere de la oka ĝis la deka. Oni legis manuskripton de proponata konstitucio, pri kiu voĉa decido estos farata en la estonta kunveno. En tiu sama ĉambro la klubo kunvenos je la tria ĵaŭdo en ĉiu monato, kaj ĉiuj estas invitataj. Oni havas lecionojn, interparolojn, kaj rakontetojn en Esperanto.

Prof. Otto Haux Mayer, kiu al kelkaj aliaj lingvistaj plumajoj aldonis antaŭ nelonge sian "Diplomito de la Brita Esperantista Asocio," nun instruas lernantojn vespere ĉiun merkredon en Ĉambro 801'a, Atwood Building, ĉe stratoj Madison kaj Clark, Chicago. Tie ĉi lernantoj povas ricevi bonegan instruadon, ĉiu pagante malgrandan sumon (25 cendojn komence kaj 25c ĉiumonate) por la elspezoj de la afero.

Polaj lernantoj havas klubon en la okcidenta kvartalo de Chicago, kiun instruas ĉiudimanĉe Sro. Gintowt, nova kaj tre entuziasma varbito de Esperanto. En la bohema kvartalo estas bohema klubeto.

The Chicago Daily Socialist daŭrigas konstante sian fakon de esperanto, sub redakcio de Baker. Tiu ĉi ĵurnalo estas posedata de granda kompanio da laboristoj, kune kun kelkaj el la pli intelektaj profesiuloj. Eble ĝi estas la unua ĉiutaga ĵurnalo en la mondo kiu enhavas konstante fakon esperantan. Certe ĝi atestas la plenan radikalecon de la laborista klaso en Ameriko, sendante tra la mondon la fortan vokon, "Laboristoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!"

BARAKTADO KONTRAŬ DIO

Vi memoras ke en antikva tempo, Jakobo laŭ la biblia rakonto, unufoje baraktadis tutan nokton kontraŭ Dio por havigi lian benon. Nu, tio ŝajnas tute malsaĝa kiam oni pripensas ĉu ĝi estas vere fakto aŭ ne, sed mi havas klarigon pri ĝi. Mi kredas ke, ĉiun fojon kiam ni eliras sur la kampoj kaj laboras, ni estas baraktantaj kontraŭ Dio por devigi lin ke li nin benu per greno, fojno, lignaĵo aŭ kio ajn por kio ni laboras. Ĉar la naturo estas la Dio de mia teologio, kaj "la baraktado kontraŭ la naturo" (the struggle with nature) ne estas frazo de mi fabrikita. Ĝi estis en ĝenerala uzo antaŭ ol mi naskiĝis, kaj ĝi ankaŭ ne devenis de la memorinda barakto de Jakobo.

Predikistoj, mi kredas, klarigas ke tiu barakto kontraŭ Dio signifas preĝadon, kaj tio ankaŭ ne kontraŭas mian kredon, ĉar miaj preĝoj estas agoj. Mia preĝo por ia ajn afero estas la ago necesa por akiri tiun aferon. Mia preĝo ekzemple por sitelo da lakto estas aliri kaj melki bovinon.

Kiam mi vidas pomon sur arbo tiel alte ke mi ne povas ĝin atingi mane, se mi ĝin deziras, mi preĝas por ĝi. Sed mi ne diras, "Ho naturo karega! mi petas ke vi faligu al mi tiun ruĝvangan pomon por ke mi ĝin manĝu." La naturo ne komprenus tion. Mi anstataŭe alprenas stangon, stoneton aŭ ian ajn taŭgan ilon oportunan kaj mi faras al tiu pomo malfortan bateton, kaj malsupren venos ĝi. La naturo komprenas tion tuj, tute kaj facile.—*Chas. E. Baker, Bryant, Wisconsin.*

EL LA PRESEJARO ESPERANTISTA

Festo de la Revuo.—Belege presita 29-paĝa broŝuro eldonita de La Revuo pri sia festo en Cambridge. Enhavas portretojn de Zamenhof, Boirac, la Trio kaj aliaj eminentaj esperantistoj. La prezo ne montriĝas, kaj eble ĝi estas senpage sendota. *Hachette kaj Ko., 79 Boulevard Saint-Germain, Paris.*

Morala Edukado de la Popola Infano.—Tre interesa parolado de Baronino de Menil pri la gardejoj, someraj kolonioj, k. t. p., por popolaj infanoj en Francujo. Enestas 23 grandaj paĝoj, francaj kaj esperantaj. Bone ilustritaj kaj presitaj laŭ plej taŭga maniero. Sm. .40. Eldono de *Esperantista Centra Oficejo, Rue de Clichy, 51, Paris.*

Verda Stelo.—La afero esperantista bone progresas en Meksikujo. Nun aperas kun la unua numero datumita

Septembron, 1907, nova gazeto, Verda Stelo. Ĝi estas oficiala organo de la Centra Meksika Esperantista Societo, kaj enhavas regule ok malgrandajn paĝojn. La jarabono estas Sm. 1.00. Oni sin turni al *Dro. Ambrosio Vargas, 3a del Relox No. 12, Meksiko, Meksiko.*

Esperantista Societaro.—Jen estas la tria eldono de la dirita dokumentaro, el la Centra Oficejo. Korektite ĝis la 30'a de Junio, 1907, ĝi enhavas tre gravajn detalojn pri la nuna stato de la esperantista movado tutmonda. Ĝi montras la adresojn kaj donas specialajn informojn pri ĉiuj esperantistaj kluboj, konsulejoj, k.t.p. Ree oni ne notas la prezon, sed ĉar la libro enhavas 140 grandajn paĝojn ni konsilas ke ĉiu mendanto sendu ĉirkaŭ unu spesmilon al *Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy, Paris.*

Katolika Preĝaro.—Libro de 180 paĝoj en kiu troviĝas ĉiuj dimanĉaj diservoj kaj la plimulto de la festoj de la jaro (katolikaj), presita ambaŭ latine kaj esperante. Kredeble estos plua volumo, ĉar tiu ĉi estas stampita "1'a volumo." Kompreneble tiu ĉi libreto (180 malgrandaj paĝoj) tre plaĉos niajn katolikajn samideanojn, kaj al ĉiu sciemulo sercanta la kuriozajn elmontrojn de la homa naturo ĝi prezentus multe da materialo. Prezo Sm. 1.00. Aĉetebla ĉe la eldonisto, *Espero Katolika, Sainte-Radegonde (Indre-et-Loire), France.*

Filipina Esperantisto.—En Aŭgusto aperis la unua numero de tiu ĉi organo de la Filipina Esperantista Asocio. En sia listo da anoj de la dirita asocio la gazeto publikigas 174 nomojn kaj diras ke ĝi ne estas plena. De kio ŝajnas ke la movado en Filipinujo estas tute forta. Flanko ĉe ke flanko kun nomoj tiaj kiaj Smith, Kelly, Ferguson, aperas Gomez, Diaz, Espinosa, montrante ke la anaro de la klubo enhavas ambaŭ amerikanojn kaj hispanojn. La gazeto estas redaktata en angla, hispana kaj esperanta lingvoj, kaj disdonata senpage al membroj de la societo. Por aliaj po ekzemplero Sm. .20.—*Filipina Esperantisto, Box 325, Manila, P.I.*

Artiste Ilustritaj Poŝtkartoj Etnografiaj.—La granda eldonista firmo bohema R. Promberger en Olomouc, Moravio, Austrio, ĵus komencis eldonadi bele ilustritajn kartojn kun karakterizaj tipoj de diversaj popoloj en Austrio kaj kun tekstoj en Esperanto. La originaloj, laŭ kiuj estas faritaj la kartoj, estas kolore pentritaj de la konataj artistoj bohemiaj Joza Uprka, Jarosiav Augusta kaj Marie Gardavska. Ĝis nun aperis 5 serioj po 10 diversaj bildoj, do entute 50 kartoj. Tiuj ĉi ilustritaj kartoj apartenas al la plej bonaj de la sama speco. Sur kartoj ne estas prezentitaj la rigidaj fotografie faritaj figuroj de popolo, sed kiel virinoj tiel viroj kaj infanoj estas prezentitaj dum ilia laborado kaj en siaj originalaj kostumoj naciaj per vere artista maniero. Novaj serioj estas preparataj.